



SALUTON !

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

15 Decembro 2005

Nº 15

Redaktoro: Araneo

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
FAX: (708) 456-2750

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;
Familio \$30; Regula \$20;
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.

Dues are needed for the routine expenses of our Society.

Check should be payable to:

The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

Kunvenoj:

Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chikago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.


Bonvenon!

La redakcio de 'SALUTON!' Sincere gratulas siajn legantojn okaze de ZAMENHOFA Tago!

Kiel donaco bonvolu akcepti tiun originalan poemon de nia ukraina samideano *Volodimir Paĉjurko*, kiu unue estis publikigita antaŭ dudek jaroj en la bulgara revuo *PACO* sub la titolo *Zamenhof*:

Tra l'kurtenoj de la historio,
Tra jardekoj, dronintaj en Leto,
Konturiĝas en monda konscio
De la Majstro senmorta portreto.
Sorto, riĉa je plagoj multopaj,
Kaj la aĝo jam klinis staturon,
Sed per siaj okuloj miopaj
Klare vidas li foran futuron.
Ni senflute lin nomas Giganto.
Lia revo fariĝas jam vero:
Esperanto – la pont-konstruanto
Inter ĉiuj popoloj de l'tero.

Jubilea Jaro



“Vi demandas min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis tiu ĉi tago? Estos por mi malfacile rakonti al Vi ĉion tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis...” Nome per tiuj vortoj komenciĝas fama letero de nia Majstro, adresita al la rusia esp-isto Nikolao Borovko, en kiu li mallonge priskribas la ideon kaj originon de nia kara verda lingvo. Mi ne citos la leteron plu, ĉar nun ĝi estas trovebla en la re-

paĝaro de nia E-societo. Nur oni devas subskteki pri signifo de la evento, 100-jariĝon de kiu ni festas ĉi jare: la Unua E-kongreso en franca urbeto Bulonjo-ĉe-Mar. Tiam la genia kreaĵo de L. Zamenhof, lanĉita la 26.07.1887, atingis sian “socian plenaĝecon”. Jam havante sian literaturon, E-o ankoraŭ ne estis sufiĉe elprovita en la parolaj komunikaĵoj. Kaj jen, en tiu memorinda 5a de Aug. 1905 ĉ. 700 e-istoj el 20 landoj kunvenis por sia oficiala kongreso unuan fojon. Post cent jaroj oni povas facile reliefigi gravajn signifojn de la evento:

1. Estis akceptita “Deklaracio pri Esperantismo”, laŭ kiu la sola (oficiala) celo de la E-movado estas disvastigi la uzon de Neŭtrala Internacia Lingvo. La dokumento ankaŭ konfirmis, ke “E-o estas nenies propraĵo, eĉ ne de sia aŭtoro mem”.

UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –
Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;
toll free: 1-800-ESPERANTO
(1-800-377-3726)
<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association
<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format
<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

Sekvantaj kunsidoj:

18an de Decembro Zamenhofa Bankedo'05

25an de Januaro – nia vicprezidanto d-ro Puramo Chong raportos pri la laboro de INA en Ŝanhajo

22an de Februaro kaj 22an de Marto – temoj estos anoncataj aldone, prelegontoj estas serĉataj

26an de Aprilo – XX datrevenon de Ĉornobila katastrofo en Ukrainio

2. La Kongreso konfirmis la netuŝeblecon de la “Fundamento de E-o”, kiu konsistas el Antaŭparolo, el la 16 bazaj reguloj de la gramatiko, el la modelaj tekstoj kaj el la ĉ. 2 800 fundamentaj radikoj. Per tia decido oni certigis stabilecon al la lingvo sen ia malhelpo al ĝia natura evoluo.

Laste okazis

Malsimile al prezidenta konkuro la lasta reeelta kunveno de nia E-societo pasis (30an de Nov.) sufiĉe kviete kaj serene. La kunsido estis plenrajta, ĉar partoprenis ĝin pli ol duono de plenrajtaj membroj, kio provizis necesan kvorumon. Probable pro la foresto de prezidanto R. Stalzer (li sukcesis je grava ekzameno – gratulojn!) mankis la raporto pro la pasinjara agado kaj ĉeestantoj decidis, ŝparante la tempon, transiri al la elektado mem. Kiel rezulto de du doktoraj rifuzoj okupi la postenon de prezidanto, oni elektis kiel societestron iaman sekretarion V. Pajuk. Pri la aliaj oficoj vi povas ekscii de la apuda kolofono. Bultena redaktoro deziras al novelektita estraro fruktononan laboron por prospero de nia kara lingvo en Ŝikagujo!

Ankoraŭ unu grava decido de la lasta kunveno: la tradicia **Zamenhofa Bankedo** ĉi jare okazos dimanĉe la **18an de Decembro** (ne 11an, kiel oni informis pli frue) je la 1.30 post tagmezo en korea restoracio **Solga**, troviĝanta laŭ adreso: 5828 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60659 (tel. 773-728-0802). Ne forgesu pri la dato!

Laste eldonita(j)

Partoprenintoj de la ĉi jara UK en Vilno eble scias pri la statistiko de Libroservo: la plej vendata libro estis *La Zamenhof-Strato* de renoma pola E-isto Roman Dobrzynski. La libro furoris, ĝi aperis samtempe en deko da lingvoj – laŭ la ideo de ĉefa monsubtenanto oni tradukis ĝin en preskaŭ ĉiuj lingvoj de EU novaj membroj (pola, litova...) kaj ne nur (kroata, japana). Oni fakte rajtas diri, ke la libro havas du aŭtorojn, ĉar ĝi aperis surbaze de interparoloj de jam menciita R. Dobrzynski kun la Nepo – d-ro L. Zaleski-Zamenhof. Jen kiel reeĥis pri la libro famaj e-istoj:

“Mi legis multon pri la varsovia getto, sed la memoroj de la Nepo ebligas tute alispecan aliron kaj komprenon de la terura tempo. Mi certas, ke la libro estos tre sukcese akceptita.” *U. Lins, Germanio*

“Vere, ĝi estas tute brila. Plaĉas al mi la glata kaj tre legebla stilo. Mi trovis amason da interesaj aferoj, kiuj fakte donas respondojn al pluraj tiklaj demandoj”. *H. Tonkin, Usono*

En la sekvanta numero:

- foto-raporto pri Zamenhofa bankedo;
- informo de d-ro P. Chong pri la lasta konferenco de Internacia Naturkuraca Asocio;
- libroprezento.

Por vi serĉis la novaĵojn de la tuta E-mondo redaktoro kaj via obeema servanto. Estu sanaj kaj feliĉaj en ĉi maltrankvila mondo!



araneoesp @ yahoo.co.uk

